lingvoj, kiel la latina kaj la greka, kaj ŝovinismaj klopodoj igi Esperanton kiel eble plej simila al la lingvo de ĉiu uzanto, facile kondukos ĝin al kaoso kaj displitiĝo. Eĉ pli rapida ol tiu de la latina, kiu havis la potencon bremson de sia riĉega literaturo kaj la konstantan kunlaboron de la sciencista komunumo. Por kontraŭbatali tiun displitiĝon ne sufiĉas la konservemo de ĝia Akademio, ĉar jam de tre longe Esperanto havas multe pli da vortoj ol tiuj kelkiloj, kiujn la Akademio decidis oficialigi. Pli granda influo nuntempa estas tiu de la vortaroj de SAT. Sed PIV2 estas multe pli granda kaj kosta ol la lernokapablo kaj la mono de la plimulto el la esperantistoj. Kaj tamen ĝi restas nesufiĉa por la bezonoj de ĉiu fakulo.

MANIERO KIEL OPV KUNLABORAS POR LA SIMPLECO DE ESPERANTO

1. Ĝi enhavas ĉiujn fundamentajn kaj oficialigitajn vortojn. Eĉ tiujn, kiuj estas preskaŭ neuzataj lastatempe. La oficiala vortprovizo de Esperanto estas la plej taŭga por la interkompreniĝo de esperantistoj en la tuta mondo.

2. Ĝi konstatas, ke sinonimoj kaj homonimoj ekzistas ek de la naskiĝo de nia lingvo. **Leopardo** kaj **pantero** estas denaskaj sinonimoj. **Firmo** (firmeco) kaj **firmito** (entrepreno) estas denaskaj homonimoj. Kaj la Akademio aldonis aliajn. Por la vorto **atlaso** (speco de teksaĵo) ĝi oficialigis la sinonimon **sateno** (sama speco de teksaĵo) kaj la homonimon **atlaso** (maparo). Kaj la uzado de la lingvo aldonis multajn

aliajn. Kelkaj utilaj kaj kelkaj senutilaj, aŭ eĉ malutilaj. Indikante sinonimojn kaj homonimojn, en la ordo de mia prefero, mi esperas, ke la uzanto de OPV faros la pli bonan elekton.

3. De la klasika (sed iom peza) vorto **konscienciproĉo** estas tre uzata la neoficiala sinonimo **rimorso**. Sed ĝi ne estas facile komprenata de orientanoj. Tial OPV gvidas la konsultanton al tria, malpli uzata, sinonimo: **pentsufero**. Ĝi certe estas pli uzinda, ĉar ĝi estas samtempe malpeza kaj facile komprenata je la unua vido.

4. OPV ankaŭ montras la neuzindecon de kelkaj homonimoj, kiuj estas insultaj por kelkaj popoloj. **Koreo** (popolo el Koreio) kaj la malsano **koreo** ne devas resti homonimaj. OPV konsideras la vorton **koreo**, nomo de malsano, EVITINDA. Anstataŭe, oni devas nomi tiun malsanon **ĥoreo**.

5. La 15-a regulo de la Plena Gramatiko de Esperanto klare indikas, pri importo de vortoj fremdaj, ke “ĉe diversaj vortoj de unu radiko estas pli bone uzi senŝanĝe nur la vorton fundamentan, kaj la ceterajn formi el tiu ĉi lasta laŭ la reguloj de la lingvo Esperanto”. Malgraŭ tiu konsilo jam ekzistas centoj da duoblaĵoj en Esperanto prenitaj el unu sola fremda radiko. Kelkaj el ili, oficialigitaj. Kaj kelkaj, eĉ fundamentaj. Se ili estas oficialaj aŭ tre uzataj ili aperas en OEB, sed ĝi ĉiam konsilas la neuzon de la superflua



duoblaĵo. Tiel vi rimarkos, ke anarkisto = **anarkiisto** (pli bona); imperialisto = **imperiisto** (pli bona); kaj patologo = **patologiisto** (pli bona).

6. Kiam neologisma radiko havas kunmetitan sinonimon sufiĉe malpezan kaj klaran, OPV ĉiam indikas ĝian ekziston, ĉar ĝi povas faciligi estontan internacian komunikadon. Tiel, ekzemple, abako = **globkalkulilo**, abnegacio = **sindonemo**, fenikso = **fajrobirdo**, ferio = **libertago**, filigrano = **akvomarko**, flaŭro = **kreskaĵaro**, fotelo = **brakseĝo**, ftiro = **publaŭso**, funikularo = **kablotramo**, gemo = **juvelŝtono**, genocido = **gentekstermo**, graco = **difavoro**, grego = **paŝtataro**, grizuo = **mingaso**, hamako = **pendlito**, helianto = **sunfloro**, helmo = **ferkasko**, hemoragio = **sangelverŝo**, hipodromo = **ĉevalkurejo**, kaj metroo = **subtrajno** estas nur malgranda proporcio el la multegaj tiaj sinonimoj troveblaj ĉi tie.

7. OPV estas mezgranda vortaro, por normalaj lingvo-uzantoj, ne

por teknikistoj. Tial ĝi ne havas detalojn, kiuj interesas nur al botanikistoj, kemiistoj kaj similuloj, kaj malfaciligas la komprenon de ĉiuj aliaj. Manĝeblaĵoj devas havi la saman simplecon de **pomo**, **piro**, **karoto** kaj **kukurbo**. Por normala homo **papajo** kaj **akajujo** estas fruktoj, kiel **oranĝo** kaj **banano**. eĉ se botanikistoj pensas alimaniere. Sur manĝotablo de botanikisto estu papajfruktoj kaj akajuaj ŝajnfruktoj. Sed sur tiu de normala homo devas esti papajoj kaj akajuoj, laŭ la ĉefaj gvidlinioj de Zamenhof.

8. Same komplikiga estas la alporto de kemiistoj, fizikistoj, gramatikistoj kaj aliaj fakuloj al la plimulto el la vortaroj. Por normala homo ne interesas la struktura formulo de kemiaĵo, sed ĝia uzado kaj ĝia influo sur la homa sano. Pri malsanoj kaj medikamentoj pli interesas la vortoj kaj klarigoj, kiujn kuracisto devas uzi en sia interparolo kun paciento, ol tiuj, kiujn li uzas en teknikaj revuoj aŭ interparoloj kun siaj kolegoj. Tia estas la gvidlinio de OPV.

9. Pri geografiaĵoj OPV ne donis lokon al la komplikigaj proponoj de kelkaj vortaristoj. Se la brazila Rio Negro havas tiun nomon pro sia koloro, kial oni kaŝu tiun fakton? Bedaŭrinde PIV2 ankoraŭ ne forigis tiun ŝimon de PIV1. Laŭ ĝi, la nomo de tiu rivero (kies nigra akvo belege kunfluas paralele al tiu de Solimono por formi la gigantan Amazonon) estas sensignife Rionegro. Se la **Nigra Maro** meritas tiun nomon, ankaŭ nia belega rivero meritas la nomon **Nigra Rivero**.

10. Same senkiale PIV1 (sekvata de PIV2) ordonis, ke nomo de historia aŭ beletra gravulo kaj tiu de normala homo estu malsamaj.

Kial? Se nacilingve unu ekzistas pro la alia, ili devas esti egalaj. Tial, en OPV estas nur **Belŝacaro** (kaj ne Baltazaro), **Hadriano** (kaj ne Adriano). Tamen, pro jam tre vasta uzado, OPV ne povis ne menciigi la duan formon de kelkaj propraj nomoj, kiel **Domingo** = **Dominiko**, **Luiso** = **Ludoviko** kaj kelkajn aliajn.

11. En OPV. kontraŭ la ordonoj de PIV1 (sekvata de PIV2), se du urboj omaĝas la saman sanktulon, iliaj nomoj devas esti egalaj, ne gravas kiun lingvon oni parolas en ili. En OPV (uzante la saman simpligan formon **San-**) estas du gravaj urboj **San-Johano**: unu en Portoriko (anstataŭ San-Juano, de PIV), kaj alia en Antigvo-Barbudo (anstataŭ Sankta-Johano, de PIV). Variaĵoj laŭ la lingvoj de la eŭropaj disdividintoj de la mondo igas Esperanton tiel konfuza, kiel iliaj disdividoj.

12. En OPV estas tradukoj de brazilaĵoj ne troveblaj en PIV. Inter ili la nomoj de ĉiuj ŝtatoj, ĉiuj ŝtataj ĉefurboj kaj aliaj geografiaĵoj speciale gravaj almenaŭ pro la brazila Esperanto-movado. Multaj el tiuj tradukoj estas delonge uzataj senprobleme, ĉar la preferinda traduko estas evidenta: **Pernambuko** / **pernambukano**, **Recifo** / **recifano**. Aliaj estas unuanime akceptataj de la ĉefaj koncernatoj sed ankoraŭ ne sufiĉe konataj tutlande, pro malbona influo de kelkaj vortaroj: **San-Paŭlo** / **san-paŭlano**, **Belorizonto** / **belorizontano**, **Tri-Riveroj** / **tri-riverano**. Kaj aliaj ankoraŭ havas disputantajn formojn. La decidoj prenataj por OPV sekvis interalie jenajn kriteriojn: (a) multe pli gravas la vortoj simplaj, kiujn oni fakte uzas, ol tiuj komplikaj, oficialaj, kiujn oni ne uzas: **Rio** (Rio) / **riano** (carioca)

(kaj ne Rio-de-Janeiro / rio-de-janeirano); **Minoj** (Minas) / **minano** (mineiro) (kaj ne Minasĵerajso / minasĵerajsano); (b) por elekta geografiajn nomojn gravas ne nur la nomo de la loko, sed ankaŭ la nomo de la loĝanto: **Manaŭo** (Manaus) / **manaŭano** (manauense) (kaj ne Manaŭso / manaŭsano); **Beleno** (Belém) / **belenano** (belenense) (kaj ne Belemo / belemano). Aliaj vortoj enmetitaj ĉi tien eble ne ricevos ĉies aprobon. La nekontentuloj rajtas lasi proprajn nomojn sentraduke.

13. La leĝo de Zipf montras, ke, en ĉiuj lingvoj vortoj tre uzataj fariĝas malpli grandaj. Tial en OPV aperas klare, ke estas preferindaj la vortoj **administro** al administracio, **civilizo** al civilizacio, **diskrimino** al diskriminacio kaj **komento** al komentario, eĉ se kelkaj, pro malsamaj kialoj, malŝatas tiun simpligon.

14. Al simila malpezigo de Esperanto kondukas nin la principo de neceso kaj sufiĉo de Saussure. Tial en OPV eblas rimarki, ke ofte ne estas uzataj afiksoj kiel **ge**, **ad**, **ec**, **um** kaj aliaj. Kiam ilia forigo lasas la vorton egale komprenebla kaj malpli peza, estas preferinde, ke ili restu for.

15. Pro tiuj decidoj, kaj aliaj samspecaj, mankas multaj vortoj en OPV. Enestas nur tiuj, kiuj ŝajnis al mi plej utilaj. La enmeto de ĉiuj ekzistantaj tro grandigus la vortaron sen iu ajn avantaĝo. Laŭ via prefero, diru Italujo kaj Polujo, kaj ne Italio kaj Pollando; mangarbo kaj oranĝarbo, kaj ne mangojo kaj oranĝujo. En OPV aperas nur la vortoj pli uzataj aŭ pli simplaj. Supozeble, tio sufiĉas.

Sciencita Angulo

Spirhaltado kaŭzas memorperdon

Personoj havantaj obstrukcan spirhaltadon suferas histoperdon en cerboregionoj, kiuj kontribuas al la memorprocezo. Jen aserto originanta el esploro farita de sciencistoj ĉe la Universitato de Kalifornio en Los-Anĝeleso, Usono.

Laŭ la aŭtoroj, la rezultoj emfazas la gravecon diagnozi spiran misfunkcion kiel eble plej frue. Oni taksas, ke ĉi tiu problemo afekcias ĉirkaŭ 20 milionojn da personoj en Usono kaj minimume 8 milionojn en Brazilo.

La dumdorma spirhaltado okazas, kiam spirvojo subite obstrukciiĝas kaj interrompas spiron, kio kaŭzas laŭtan ronkadon kaj dumtagan kronikan lacon. Ankaŭ pli altan riskon de apopleksio, koronariaj malsanoj kaj diabeto trovis antaŭaj esploroj.


“La rezultoj montras, ke malfaciligita spirado dumdorma povas serioze difekti la cerbon, malutilante memoron kaj rezonadon”, diris la ĉefaŭtoro, Ronald Harper, profesoro de neŭrobiologio ĉe la Medicina Fakultato David Geffen.

La sciencistoj analizis la cerbajn mamecajn korpojn, tiel nomatajn ĉar ili similas al mametoj. Ili estas parto de la limba sistemo kaj partoprenas la memorprocezon.

La grupo de Harper skanis la cerbojn de 43 havantoj de dumdorma spirhaltado per magneta resonanco, por kolekti bildojn de la tuta organo,

inkluzivante detalojn de la mamecaj korpoj. La eteco de la strukturoj kaj ilia proksimeco al ostoj kaj fluidoj malfaciligis ekhavi bildojn laŭ la ordinara maniero. Tial ili mane serĉis la mamecajn korpojn en altadifinaj bildoj kaj kalkulis iliajn volumenojn per la konturoj.

Komparante la rezultojn al bildoj el 66 personoj de la kontrolgrupo,



ne suferantaj la misfunkcion, la sciencistoj konstatis, ke la suferantoj de spirhaltado havas mamecajn korpojn proksimume 20% pli etajn, precipe ĉe la maldekstra flanko de la cerbo.

“La rezultoj estas eĉ pli gravaj, ĉar pacientoj, kiuj suferas memorperdon kaŭzatan de aliaj malsanoj, kiel Alchejmer aŭ alkoholismo, ankaŭ montras malgrandiĝon de la mamecaj korpoj”, emfazis Rajesh Kumar, alia aŭtoro. Alia grava punkto emfazita de la aŭtoroj estas, ke la memorproblemoj pludaŭras, eĉ post kiam oni kuracis la dumdorman spirhaltadon. Tiu ĉi fakto reliefigas la seriozecon de la difektoj.

Por la venonta fazo de la esploro, la sciencistoj intencas ekzameni, kiel la dumdorma obstrukca spirhaltado kaŭzas histoperdon ĉe la mamecaj

korpoj. Unu hipotezo, laŭ Harper, estas la sinsekvaj malaltiĝoj de oksigenoniveletoj. Dum spirĉesa epizodo, la cerbaj sangotuboj mallarĝiĝas, malaltigante la nivelojn de oksigeno ĉe la cerbaj histoj kaj kaŭzante ĉelmortadon. La procezo ankaŭ stimulas inflamon, kio plie malutilas la histojn.

Frua risko

Kaŭze de ŝanĝoj en vivkutimoj, kiel netaŭga nutrado kaj manko de regula korpekzercado, pli kaj pli da infanoj kaj adoleskuloj tendencas al ateroklerozo, laŭ esploro farita ĉe la Medicina Fakultato de la Ŝtata Universitato de Kampino, San-Paŭlo, Brazilo.

Oni konstatis nenormalajn valorojn de kolesterolo, maldensa lipoproteino kaj trigliceridoj, respektive, en 44%, 36% kaj 56% de la ekzamenitaj infanoj, kiuj aĝis de 2 ĝis 9 jaroj. La nenormalaĵoj montriĝis en 44%, 36% kaj 50% de la infanoj kaj adoleskuloj, kiuj aĝis de 10 ĝis 19 jaroj.

Laŭ la ĉefaŭtorino, Eliana Cotta de Faria, tiaj niveloj fariĝas pli kaj pli oftaj, probable pro ŝanĝoj en manĝkutimoj kaj tropezeco, kune kun malplioftiĝo de regula korpa ekzercado. “Oni ĉiam devas emfazi, ke ekzistas kunagado de mediaj kaj genaj faktoroj en la estigo de altaj lipidoniveletoj. Alia aspekto emfazinda estas la fakto, ke nia esploro pritraktis populacian specimennon, kiu serĉis malsanulejan servoreton, kaj tio nature selektas la kazojn studotajn”, ŝi diris.

La esploristino asertas, ke pluraj studoj montras, ke la koronariarteria malsano komenciĝas silente en infanaĝo kaj klare progresas dum pliaĝado. “Frua diagnozo de troaj lipidniveloj, pli kaj pli oftaj en infanoj kaj adoleskuloj, estas esenca por antaŭmalhelpo de ĉi tiu malsano, precipe kiam ekzistas en la familio antaŭaj signoj de riskofaktoroj”, ŝi emfazis.

La niveloj trovitaj povas esti atribuataj tiel al mediaj faktoroj, kiel al genaj. En kelkaj kazoj, ekzistas familiaj genaj difektoj regantaj enzimojn, proteinojn kaj ĉelricevilojn, kiuj respondecas pri la katabolo de lipidaj kaj lipoproteinoj cirkulantaj, kio kaŭzas seriozan altiĝon en ĉi ties koncentro. Tiuj faktorkombinoj konsistigas la primarajn trolipidecojn, kiuj ne dependas de mediaj faktoroj.


La rezultoj indikas plie kombinon de pluraj problemoj, kiel plialtiĝo de totala kolesterolo, plialtiĝo de trigliceridoj kaj malplialtiĝo de maldensa lipoproteino, la tiel nomata “bona kolesterolo”, kiu forprenas kolesterolon el la histoj kaj portas ĝin al la hepato, por posta eligo per la galo.

Eliana reliefigas, ke la ofte de la metabola sindromo (trolipideco, tropezece kaj alta glikozo) en infanoj tre kreskis dum la lasta jardeko. “Ni bezonas enkonduki edukprogramojn en la lernejojn, kiuj emfazas la gravon de sanfavoraj manĝkutimoj, malaperigu tropezecon kaj stimulu regulan korpekzercadon. Krome, oni faru periodajn analizojn de sangolipidoj, ĉiam, kiam ekzistas unu aŭ pluraj riskofaktoroj de kormalsano, kaj oni serĉu medicinan gvidadon por kuracado, kiam necese”.

Lunoj, kiuj kolizias preskaŭ ĉiutage

Jen impresa spektaklo, nur nun eltrovita. Grandskalaj kolizioj okazas preskaŭ ĉiutage en unu el la ringoj de Saturno, nomata F. La trovon faris sciencistoj el Unuigita Regno kaj Francujo.

Surbaze de informoj senditaj de la sondilo Cassini, kiu orbitas ĉirkaŭ la dua plej granda planedo de la Suna Sistemo, la eŭropaj esploristoj trovis pruvon de etaj “lunoj” en la brila nukleo de la ringo F. Ili ankaŭ observis, ke la formo de la ringo rezultas de la kontinua efiko de gravitacio kaj kolizioj.



La ringo F estas unu el la plej mallarĝaj ringoj de Saturno, kaj situas nur 3 mil kilometrojn for de la fino de la ringo A. Ĝi estis trovita en 1979, surbaze de fotoj faritaj de la sondilo Pioneer. Temas pri aranĝo kiu konstante ŝanĝiĝas, kun formvarioj, kiuj daŭras dum malmultaj horoj aŭ pluraj jaroj.

La grupo, kunordigata de Carl Murray, de la Londona Universitato, indikas, ke la aparta formo de la ringo F estas kaŭzata de regulaj kolizioj inter etaj lunoj, kiuj, laŭ la

opinio de la sciencistoj, estas unikaj en la Suna Sistemo. “La regiono de la ringo F estas verŝajne la nura en la Suna Sistemo, en kiu koliziprocezoj grandskalaj okazas kun preskaŭ ĉiutaga ofte”, ili reliefigas.


La sondilo Cassini-Huygens estas tasko de Nasa, la usona spacagentejo, asocie kun la eŭropa kaj itala spacagentejoj. Ĝia lanĉo okazis en oktobro de 1997.

Tuj eksplodonta

Internacia grupo de astrofizikistoj detektis ultraviolan radiondon sendatan de supergiganta stelo tuj eksplodonta. La detekto okazis momentojn antaŭ ol la ŝokondo, kaŭzata de la kolapso de la stelnukleo, atingis la supraĵon de la stelo kaj fortege forĵetis ĝian kovraĵon. Tiu ĉi unika fazo de la formado de supernova stelo estis observita per la ultraviola spacteleskopo Galex.

La esploron kunordigis de Kevin Schawinski, el la Fizika Departemento de la Universitato de Oksono, Unuigita Regno. Ankaŭ partoprenis sciencistoj el Germanujo, Kanado, Francujo kaj Suda Koreujo.

Masivaj steloj suferas perfortajn mortojn pro elĉerpiĝo de la atomnuklea energifonto en siaj nukleoj. Tio ĉi kaŭzas katastrofan kolapson, kiu formas supernovan stelon. “La eksplodaj mortoj de masivaj steloj estas dramoplenaj eventoj, kiuj semas la Univerŝon per pezaj elementoj kaj produktas nigrajn truojn, pulsostelojn kaj la plej energiriĉajn eksplodojn de gama-radioj. La energio rezultanta



el tiu ĉi procezo povas reguligi la kreskadon de galaksioj”, reliefigis la aŭtoroj.

La nova esploro, kiu studis la supernovan stelon SNLS-04D2dc, rivelis ultraviolan radiondon, kiu manifestiĝis antaŭ la ŝokondo kaj varmigis la stelsurfakon dum ĉi tiu komencis plivastiĝi. Tiu ĉi tute nova observo povas helpi sciencistojn pli bone kompreni la internan strukturon kaj fizikon de masivaj steloj kolapsantaj, ĉar la ĝis nun ekzistantaj datenoj pri tia fenomeno rilatas al epizodoj, kiuj okazis plurajn tagojn post la steleksplodoj.

La posteulo de Hubble

Oni antaŭvidas por 2013 la lanĉon de la posteulo de la spacteleskopo Hubble, unu el la plej eminentaj instrumentoj en la historio de astronomio, kiu ekde 1990 helpas homojn pli bone koni la strukturon kaj historion de la Universo.

La spacteleskopo James Webb havos la duonon de la pezo de Hubble, ĉar ĝi malhavos plurajn partojn, por ke ĝi povu posedi la plej gravan ilon: spegulon kun 6,5 metroj da diametro, kiu ebligas observi distancojn hodiaŭ neimageblajn.

La defora observado okazos ne nur space, sed ankaŭ tempe, rilate al steloj kaj aliaj objektoj,

kies lumo estos observata multe pli malfrue ol ilia sendado. Laŭ la respondeculoj pri la projekto, per James Webb eblos retrorigardi 13 miliardojn da jaroj, tuj post la Granda Eksplozo, por ĉeesti kaj pli bone kompreni, ekzemple, la naskiĝon de galaksioj.

“Portion atingi, ni esence bezonas grandan teleskopon, ĉar la objektoj, estante tre foraj, ne montriĝas klare”, diris la astrofizikisto Jonathan Gardner, estro de la Laboratorio pri Observa Kosmologio de la Centro Goddard pri Spacvojaĝoj, de Nasa, la usona spacagentejo.

La nova teleskopo havos lumkolektan areon sesoble pli grandan ol Hubble. “Ĉar la ĉefspiegulo havas 6,5 metrojn da diametro, kaj la rakedo, kiu lanĉos ĝin havas iomete pli ol 5 metrojn, James Webb vojaĝos ‘faldite’. Forlasinte la rakedon, ĝi estos malfaldita, kaj ĝiaj segmentoj estos kunvicigitaj”, klarigis Gardner.

James Webb rezultas el kunlaboro inter Nasa kaj la kanada kaj eŭropa spacagentejoj. La koston de la sendo oni taksas je 4,5 miliardoj da dolaroj.


Ĝi orbitos proksimume 1,5 milionojn da kilometroj for de la Tero. La spacoŝipo tenos sin je konstanta distanco de nia planedo, por kio sufiĉos etaj movoj komandataj defore.

James Webb estas projektita por labori en temperaturoj de -225C. “Por atingi tiajn temperaturojn, ĝi bezonos multe malproksimiĝi de la Tero. Hubble kaptas sunlumon je ĉiu horo kaj duono, kio postulas, ke ĝi sin kaŝu

malantaŭ la Tero por remalvarmiĝi. James Webb situos je 1,5 miliardoj da kilometroj, malantaŭ panelo, kiu funkcios kiel lumblokilo kun tre alta ŝirmokapablo”, komparis Gardner. Oni uzos sestavolan panelon por garantii perfektan izolitecon. “Se ni uzus nur unu ŝirmotavolon, iu spacobjekto, koliziinte kontraŭ la teleskopon, povus fari truon, tra kiu la sunradioj pasus, kaj tion ni intencas eviti”.

Laŭ Gardner, tiu ŝirmomanko estas unu el plej grandaj problemoj de Hubble. Cetere, la eletronikaj instrumentoj de la nuntempa teleskopo ne funkcias ĝuste. Tial, en oktobro Nasa sendos la spacomnibuson en vojaĝo, kiu celas anstataŭigi la difektitajn instrumentojn. Sed la usona agentejo jam avizis, ke tiu estos la lasta riparo de la teleskopo, kiu esperinde funkcios dum pluaj kvin jaroj.

“Ni volas, ke Hubble restu en space la plej longe kiel eble, sed, samtempe, ni deziras pli grandan teleskopon. La Universo plivastiĝas, kaj ni ankaŭ bezonas plivastigi nian scion”, diris Gardner. Kune kun la plivastiĝo de la Universo okazas plilongigo de lumondoj; tial Webb estas projektata por funkcii per subruĝa lumo – Hubble funkcias precipe per videbla lumo



kaj ultraviola radiado. “Por vidi la unuajn galaksiojn, ni bezonas teleskopon, kiu kapablas vidi la lumon venantan de tie, kie la steloj naskiĝas.”

La Franca Gujano estas la loko elektita por la lanĉo, ĉar ĝi situas proksime al la ekvatoro kaj al la oceano – en okazo de eraro, la rakedo falos enmaren. “Pro la distanco, je kiu ni intencas, ke ĝi laboru, ne eblos eraroj en la lanĉo aŭ pozicio, ĉar ni ne povos sendi skipojn de kosmonaŭtoj por agordi ĝin, samkiel ni faras al Hubble”, reliefigis la fizikisto. Hubble situas multe pli proksime, je malpli ol 600 kilometroj de la tera supraĵo.

La astrofizikisto atentigas, ke, samkiel Hubble, unu tagon ankaŭ James Webb emeritiĝos, kiam ensceniĝos spacteleskopo pli granda kaj pli moderna, por kontentigi homan malkvieton. Eĉ kvankam James Webb ankoraŭ ne estas lanĉita, oni antaŭvidas, ke ĝia rolo finiĝos en 2023.

Riveligās detaloj de la Venusaj nuboj

Bildoj pri la nubostrukturo de unu el la plej enigmaj atmosferoj de la Suna Sistemo, senditaj de la sondilo Venus Express, de la Eŭropa Spac-Agentejo (ESA), rivelas detalojn ĝis nun nekonitajn pri nia ĉielnajbaro.

Venuso estas kovrita de densa nubtavolo, kiu etendiĝas de 45 ĝis 70 kilometroj for de la planeda supraĵo. Temas pri nuboj rapide moviĝantaj, kiuj konsistas el mikroskopaj gutoj de sulfata acido kaj aliaj aerosoloj.

Antaŭaj esploroj montris, ke la nuboj similas al la nebulo ordinare trovata sur la Tero, sed ilia dikeco malhelpis pli detalajn analizojn. Per la instrumentoj ĉe Venus Express, kiu orbitas ĉirkaŭ la planedo, la eŭropaj astronomoj sukcesis observi la strukturon de la nuboj per diversaj ondlongoj: videbla lumo, ultraviolaj radioj kaj radioj proksimaj al la subruĝaj.


La rezultintaj bildoj montras plurajn signojn kaŭzatajn de variaj koncentroj de diversaj aerosoloj ĉe la supraĵo de la nubtavolo. Unu el la bildoj, kiu montras ĝeneralan aspekton de la suda hemisfero de Venuso, reliefigas, ke la aspekto de la nubtavolo ŝanĝiĝas radikale de la ekvatoro ĝis la polusoj (ĉi-okaze, la suda poluso).

Ĉe malaltaj latitudoj, la nuboj aperas pli fragmentaj. Tio ĉi indikas fortajn kaj konvekciajn movojn – similajn al tiuj de akvo bolanta en kuirpoto –, nutratajn de la suna radiado, kiu varmigas la nubojn kaj la atmosferon mem.

Ĉe mezaj latitudoj, la scenejo estas alia: konvekciaj movoj estas anstataŭigataj de pli densaj nuboj, kio indikas, ke la konvekcio malkreskas, laŭgrade kiel malpli da sunradiado estas ensorbata de la atmosfero.

Alia ŝango estas observata ĉe altaj latitudoj, kie la nuboj aperas kiel densa kaj malhela nebulo, preskaŭ senforma, kvazaŭ kapuĉo kovranta la polusojn de la planedo.

Aliaj bildoj faritaj de Venus Express, pri la ekvatora regiono, montras detalojn de la nubosupraĵoj kaj de la brila rubando de sulfata acido.



Fonto: FAPESP, NASA, ESA

BEL informas

Redaktas:
Paulo Sérgio Viana



psviana@terra.com.br

Kiu aŭdacas defii la miton de Babelo?

Alberto Emerson Werneck Dias

Kiu aŭdacas defii la miton de Babelo? Sed kiu povas diri, ke oni havas la solvon? Kiu havas la kuraĝon por aserti, ke Esperanto estus tia solvo? Kiu ne timas, ke la angla venos “forvori” ĉiujn aliajn lingvojn?

Nu, Esperanto jam vere havis plurajn oportunojn pruvi sin kiel LA unuaelekta interlingvo. Sed ĝi ankoraŭ ne firmiĝis kiel tia. Kio mankas? Ĉu tio okazas pro la fakto, ke ĝi ne estas lingvo tiel neŭtrala, kiel oni asertas? Finfine, ĝia vortprovizo estas preskaŭ tute centreŭropa, preskaŭ tute latina. Kompreneble, ĝia gramatiko bonŝance ne renaskis la sintaksan kaj morfologian kompleksecon de la latina. Kaj ĝia aglutina karakterizo garantias eĉ alproksimiĝon al la mandarena, lingvo parolata de la plej vasta grupo nuntempe. Almenaŭ la aziaj esperantistoj ne plendprotestas pri iu europocentrismo de Esperanto. Kaj ĝis nun nenio pli bona aperis en tiu kampo.

Kaj intertempe, la angla daŭrigas sian antaŭeniron, senpaŭze, anstataŭigante ĉiujare almenaŭ dek aliajn lingvojn. Aliaj ankaŭ fortaj lingvoj faras la samon en sfero iom pli malgranda. Oni antaŭvidas, ke en 2050, duono de la ĉirkaŭ 6000 restantaj lingvoj estos malaperintaj. Ĉu estus vere grave konservi la multlingvecon aŭ ĉu lingvoj devas pere, kaŭze de natura selektado?

La nuntempaj 6000 lingvoj estas tio, kio restas el nombro

kalkulata kiel multe pli granda en la pasinteco. Sed la lingvoj batalis inter si ĝis la plej fortaj “voris” la pli etajn, kaj finfine restis nur unu superlingvo, disvastigita tra la tuta globo, minacanta, rilate al la nombro da parolantoj, anstataŭigi eĉ la mandarenan.

Natura selektado kaj perforto

Sed ĉu tia “natura selektado” estas ja iel natura? Ĉar vere neniu lingvo per si mem kontraŭbatalas alian. Estas la popoloj, kiuj interbatalas, kaj rolas iu povludo, kiu regas la venkantojn kaj la venkitojn. Neniu popolo forlasas sian lingvon propravole. Aŭ ĝi estas devigata forlasi sian lingvon, aŭ ĝi decidas, ke estas pli konvene forlasi ĝin kaj adopti tiun de la venkintoj. En la pasinteco, praktike ĉiuj komunumoj havis tradukistojn, interparolantojn de la estroj, portantojn de la popola voĉo. Sed iom post iom, pli kaj pli da homoj volis havi voĉon en la interpopola komunikado, kaj la nombro da interpretistoj fariĝis tro malmulta. Tiel, pro politikaj kaj sociaj kaŭzoj, la plej povhavaj nacioj ekpostulis, ke iliaj interparolantoj uzadu ilian lingvon kaj altrudis ĝin iom post iom aŭ ja perforte. Post iom da tempo, la gejunuloj jam ne vidis utilon konservi la lingvon de siaj prapatroj, kaj ekadoptis tiun de siaj konkerintoj, eĉ en ĉiutagaj konversacioj.

Se ne estus militoj kaj ĉiuj parolantoj estus simple ekstermitaj, forigitaj por ĉiam de la surfaco de la Tero, ĉu oni povas taksu tion “natura”? Ĉu tio estas neevitebla? Tute ne! Mi kredas, ke tio ne estus la vojo por malkonstrui Babelon, por ke ĉiuj denove parolu unu solan lingvon komunan. Verdire, ne tion oni volas – superlingvon de ĉiopova popolo, adoptitan de la pli malmultnombraj komunumoj por konveno de la regantoj. Tio, kion oni volas, estas, ke ĉiu popolo havu la rajton teni sia(j)n propra(j)n lingvo(j)n – estas nacioj dulingvaj kaj multlingvaj – kaj ke ili nur uzu en interpopola komunikado iun ilon projektitan por tio. Tia ilo estus aŭ aŭtomata tradukilo aŭ logika kaj facile lernebla lingvo por ĉiuj teranoj. La nuntempa teknologio estas malproksima de la produktado de tiaj porteblaj automataj tradukiloj en kontentiga maniero. Restas por ni la logika solvo, la uzo de lingvo, kiu, se ne facila por ĉiuj, tia estas por la plejparto, kaj por neniu estas kompleksa.

Multlingvismo kaj Esperanto

Jam estas pruvite, ke Esperanto povas esti rapide adoptita de afrikaj kaj aziaj landoj, de amerikaj kaj eŭropaj nacioj. Diversaj indiĝenoj jam provis sukcese uzi ĝin pere de la projekto Indiĝenaj Popoloj. La lasta Universala Kongreso, en

Japanio, pruvis, ke aziaj parolantoj de nehindeŭropaj lingvoj povas adopti ĝin kun natureco kaj flueco. Kaj, almenaŭ tiuj, kiuj ĉeestis la kongreson, ne sin montris maltrankviligataj de la eŭropeco de Esperanto. Ĉar en la dialogo inter Oriento kaj Okcidento la plej probable estas, ke oni uzos eŭropan lingvon, do estu ĝi almenaŭ lingvo sen multaj nelogikaj trajtoj, sen la miloj da esceptoj de la naciaj lingvoj, kaj precipe ne forte markita de la kulturo de malmultaj landoj.

Interesas al la mondo, ke la nuntempa multlingvismo estu konservata, ĉar ĉiu lingvo, ĉiu lingva varianto, entenas malsaman mondkoncepton, diversan percepton de la realo. Nur tiel la homo, la homa raso, povas esperi iutage kompreni sian originon pli bone, kaj sian destinon, sian kialon por ekzistado.

Sed al kiu vere interesas, ke oni atingu tiun sinkomprenon? Necesas, ke la esperantistoj sciu; necesas, ke ili tion malkovru, male ili riskas maltrafi la trajnon de la Historio, kaj, ne havante precizajn argumentojn, ili riskas permesi, ke tiuj, al kiuj tio ne interesas, regu por ĉiam la situacion kaj ke, en proksima estonteco, malmultiĝu la kvanto da lingvoj nuntempaj al malpli ol la duono.

Ĉiu esperantisto devas sin trejni por argumenti, ĉar el la ideobatalado kaj la konvinkado de aliaj naskiĝas la novaj esperantistoj. La daŭrigado de Esperanto dependas malpli de naskiĝoj, de transgeneraciaj vertikalaj konstantaj transdonoj, ol de rapida kaj efika horizontala transdono. Tio estas, interesas malpli bataliono da denaskuloj, ol legio da parolantoj konvinkitaj racie kaj logike pri ĝiaj avantaĝoj.

Ĉu Esperanto prunteprenu anglaĵojn?


Lingvistike parolante, estas nenio natura en la forlaso de lingvoj fare de iliaj parolantoj. Tamen, pere de pruntado, la mildigo de la lingva maldiafaneco de diversaj idiomoj kondukas nature al konverĝo iompostioma, kio ebligas la kreadon de lingvistikaj iloj pli universalaj. Se tiel estis, ekde la teritoria antaŭenpuŝo de la latina ĝis la lingva pasteŭrizado, kiun reprezentas Esperanto, kial ne devus esti tiel nun, kun la fizika, komunikmedia kaj virtuala antaŭeniro de la angla, eniranta pere de pruntoj en multajn lingvojn ĝis nun maldiafanajn?

Provi eviti aŭ kontraŭstari la anglaĵojn en la plej diversaj lingvoj estas provi kovri la sunon per kribrilo, kaj estas iri kontraŭ la vera origino kaj motivo de Esperanto, estas halti en la tempo. Esperanto estas lingvo komplete farita el pruntprenoj ekde sia komenco. Kaj tiaj pruntprenoj nur estis eblaj pro la sintrudemo kaj

leksika internacieco de la latina kaj la greka. Ĉu ne estus nun la tempo por aktualigi Esperanton, por ke ĝi daŭru pli kaj pli internacia, profitante la novajn sloganojn, kiuj venas fulmotondre de la amerika, eŭropa, afrika kaj azia anglaj variantoj?

Pruntoj neniam mortigis lingvojn, sed ja modifis kelkajn, kaj la rezulto estis ilia riĉigado. Vidu ni la kazon de la rumana, lingvo kiu naskiĝis kiel novlatina kaj iom post iom ensorbis tiom da slavaj vortoj kaj trajtoj, ke hodiaŭ oni dubas pri ĝia latinida karaktero. Finfine, vidu ni la ekzemplon de la angla, eble la plej permesema lingvo en la mondo rilate al pruntado. Ĝi hodiaŭ povus eĉ esti konsiderata kvazaŭ latinida, pro la giganta kvanto da vortoj prunteprenitaj el la franca kaj la latina, kiuj ĝin riĉigis kaj ebligis ĝian internaciigon tiel rapide. Tiel marŝas la lingvoj. Kion fari?

E



Turo Babela, 1679. Athanasius Kircher

La sinonimludo

Francisco S. Wechsler

En tiu ĉi numero mi komencas serion, en kiu mi esploras la similecojn kaj malsimilecojn inter certaj vortoj de Esperanto. Esperinde tiu ĉi komparo estos kaj plezuriga kaj lerniga. Mi celas: a) atentigi pri la fakto, ke troveblas en nia lingvo multaj grupoj de vortoj kun similaj signifoj (kelkfoje eĉ egalaj!); b) helpi plivastigi kaj pliprecizigi la vortprovizon de la gelegantoj; c) atentigi pri la fundamenteco, oficialeco aŭ neoficialeco de ĉiu radiko, celante la aŭtorojn de lernolibroj kaj tekstoj por komencantoj. En ĉi tiu revuo, mi ne kondamnas iun ajn vorton; sed samtempe mi opinias, ke la komencantoj devas unue lerni kiel uzi la fundamentajn radikojn kaj profiti la rimedriĉan sistemon de vortkonstruado.

Mi tute ne pretendas, ke la sinonimlistoj pritraktotaj estu kompletaj aŭ ke miaj klarigoj fariĝu ia Biblio pri “ĝusta” uzado. Nia bazo estos la Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto (2005), sed ni ofte konsultos aliajn fontojn. La gelegantoj estas invitataj esplori diversajn fontojn kaj konkludi per si mem.

Konvencie, asterisko markos fundamentecon de la radiko; numero markos la aldonon, per kiu la radiko oficialiĝis; kaj markomanko signifos, ke la radiko ankoraŭ ne estas oficiala.

Do hodiaŭ ni pritraktos la jenan grupon de vortoj: *malofta**, *neordinara*, *eksterordinara**, *nekutima**, *kurioza¹*, *stranga**, *bizara*, *originala¹*. Kiel ili similas aŭ malsimilas?

Ofte signifas: multajn fojojn sinsekve, aŭ en konsiderinde granda

nombro da okazoj. *Ofta* signifas: okazanta ofte. Kaj do *malofta* signifas: okazanta malmultajn fojojn (hajlo estas malofta okazaĵo).

Ordinara, laŭ PIV, havas du signifojn: 1. ne diferencanta de la plimulto el la okazoj (ordinara manĝaĵo, ordinara vesto); 2. ne diferencanta de la normala grado (ordinara intelekto). Do *neordinara* karakterizas ion, kio diferencas de la plimulto per kvalito aŭ grado.

Kaj kion diri pri *eksterordinara*? NPIV distingas du signifojn: 1. tute diferenca de kutima uzado; 2. tre diferenca disde normala grado aŭ kvalito. Kiel ekzemplojn por signifo 1, ni citu: *eksterordinara* maniero de kuirado; *eksterordinara* feltkoloro. Por la signifo 2: *eksterordinara* inteligento; *eksterordinara* pureco. Efektive, *eksterordinara* estas iom pli emfaza ol *neordinara*, sed esence ambaŭ vortoj signifas la samon.

Ni nun pritraktu la verbon *kutimi*: emi agi aŭ fari, kaŭze de ofta ripetado. Parenca al ĝi estas *kutimo*, la emio fari, kaŭze de ofta ripetado, aŭ agmaniero, rezultanta de longa uzado. *Kutima* signifas: rezultanta de kutimo. Kompreneble, io *kutima* estas ankaŭ *ordinara*. La diferenco kuŝas en tio, ke la *kutimecon* kaŭzis ripetado, kaj ja temas pri nuanco. Sekve, *nekutima* karakterizas ion, kion oni ne faras ripete (*nekutima* letero), aŭ kio kontraŭas establitan agmanieron (*nekutima* konduto). La unua signifo estas proksime parenca al *neordinara*, dum la dua pli diferencas disde ĉi-lastata.

La adjektivo *kurioza* signifas: ekscitanta la intereson aŭ scivolon per

sia malofteco, neordinareco (kurioza moro, kurioza pensmaniero). Vidu, ke ankaŭ *kurioza* entenas ideojn pri malofteco aŭ neordinareco; sed krome ĝi emfazas la reagon, kiun io kaŭzas.

La adjektivo *stranga* estas iom pli emfaza ol *kurioza*: diferenca de rutinaj samspecaĵoj kaj per tio kaŭzanta miron (reveninte al civilizo, la insulano trovis ĉion *stranga*). Proksime parenca al *stranga*, sed ne identa al ĝi estas la neoficiala vorto *bizara*, kiu signifas: malharmonie *stranga* (la torditaj branĉoj havis bizaran formon). Do, *bizara* kombinas la ideojn pri strangeco kaj malharmonio.

Ni finas per *originala*. NPIV listas tri akceptindajn signifojn por ĝi: 1. prezentanta la unuan, primitivan formon de io (originala teksto); 2. tia, kia ne imitas aliajn (originala solvo de problemoj); 3. ne simila al aliaj kaj iom *stranga* (skribi en originala stilo). La du unuaj klare diferencas disde *stranga*, sed la tria estas tre proksima al ĉi-lastata.

Ni invitas la gelegantojn esplori siajn vortarojn, ĉu libroformajn, ĉu virtualajn, kaj vojaĝi tra la oceano de sinonimoj. Esperinde tiu ĉi vojaĝo estos same agrabla, plezuriga kaj riĉiga, kiel ĝi estas por mi. Nur unu tia esploro sufiĉos por forpeli definitive la ideon, ke nia lingvo estas malriĉa je sinonimoj kaj nuancoj.

En la venonta numero, ni pritraktos la jenan vortogrupon: *taŭga*, *oportuna*, *konvena*, *adekvata*, *konforma*, *laŭa*, *alcela*, *laŭcela*, *specifa*. Ĉu vi scias klarigi la similecojn kaj diferencojn?

Kiel traduki?

En ĉi tiu numero ni inaŭguras rubrikon, kiu celas stimuli la lernadon kaj elpensadon de parolturnoj en Esperanto. En ĉiu numero ni prezentos tri esprimojn en la portugala lingvo, kies tradukon ni invitas vin entrepreni. Bonega konsultfonto estas la Esperanta Proverbaro de Zamenhof, sed ne limigu vian horizonton nur al ĝi. Sendu vian tradukon al la adreso de la redaktoro: wechsler@fca.unesp.br. En la sekva numero, ni prezentos la solvojn proponitajn kaj komentos pri ili. Bona traduko ne nepre imitu la vortigon de la originalo, sed, male, ĝi estu eleganta, alloga kaj fidela al ties senco. Jen la esprimoj por ĉi tiu numero:

1. Estou me lixando para sua opinião.
2. Perdido por cem, perdido por mil.
3. De grão em grão a galinha enche o papo.

Ĉu vi akceptas la defion? Do ek al la laboro!

En la limbo, atendente... (Daŭrigo de paĝo 11)

el tiu Limbo, el tiu nebulo, kiu ĉion kaŝkovras, el tiu apatia stato, el tiu senfina atendo. Kiun direkton ŝi elektu serĉe al sia perdita animo?

Ŝi enspiras funde - iu venko. Antaŭe la spiro estis kurta kaj supraĵa. Ŝi denove enspiras ankoraŭ pli funde kaj preskaŭ kapturiniĝas. Pli funde. Ŝi volas plenigi la pulmojn je aero. Tuj poste ŝi malfermas la kranon de la duŝilo, demetas la vestaĵojn kaj restas senmova sub la akvoŝpruco. Antaŭ ŝiaj fermitaj okuloj, la Rado de la Fortuno, tiu granda arketipa mandalo, rondiras malrapide alternigante la supron kaj la malsupron. Kiel eskapi el tiu eterna rondiro? Kiel venki la cirklan tempon?

- Kiel eliri el tiu situacio? - ŝi demandas al si mem laŭtvoĉe.

Kvazaŭ responde, ŝi ekaŭdas la KD-on, kiu estas ludata en najbara konstruaĵo. Temas pri iu nova najbaro, kiu ŝatas klasikan muzikon. La sono eniras senobstakle tra la baskulfenestro. Ŝi tuj rekonas la nekonfuzeblan tembron de Fischer-Dieskau, la granda solisto de la Kantatoj de Bach. Ŝi havas la saman sonregistron, sub la direktado de Karl Richter. Temas pri la kantato "Christ lag in Todesbanden" (Kristo en la agonio de la morto). Kio estas depresio, se ne tiu mortiga agonio? Ardantaj larmoj estas finfine plorataj. La Rado de la Fortuno daŭre rondiras, sed nun ŝi ne plu estas en la periferio,

sed senmova en la Centro, ekster la Rado, for de la Tempo. En la centro de la Rado brilas la vorto ARTO. Nur pere de ĝi oni povas trovi la elirejon. Kvazaŭ renovigite de baptaĵoj, ŝi ĉirkaŭvolvas sin en la bantuko kaj iras al la dormoĉambro. Ŝi viŝas la larmojn. La nebulo fordisiĝis. Ŝi sidiĝas, nuda, antaŭ la skribotablo, malfermas la taglibron kaj reprenas la dialogon kun sia animo.

(*) *Mi neniam fartas bone ie ajn kaj mi ĉiam kredas ke mi fartos pli bone tie, kie mi ne estas.*





44^a

brazila
kongreso de

esperanto

junularo kaj esperanto: bazoj por la estonteco

12a ĝis 17a de Julio 2009

Juiz de Fora - Brazilo

Aŭspicij

Brazilo Esperanto-Ligo



Organizado



KEA

Associação Cultural de Esperanto

29^a brazila esperantista junulara kongreso

Informoj: <http://44bke2009.blogspot.com>



LIBROSERVO
Brazila Esperanto-Ligo

Liga Brasileira de Esperanto

Esperantista de coração

LIBROSERVO • LibroServo

CATEGORIAS

HEJMA vojoro	Esperanto		
Dicjon. & Lingvistikos (8)	Didaktikos (15)	Especializados (8)	Romances (27)
Teatro e Poesia (7)	Aŭdio e Vídeo (5)	Religiosos (4)	Diversos (8)

Aligiu al BEL

www.esperanto.org.br

Brazila Esperanto-Ligo



Aligiu al BEL

www.esperanto.org.br

Brazilei

aperas kvar fojojn jare



Praktika revuo

por praktikaj kursgvidantoj

Eldonata de
Brazila Sekcio de ILEI



www.ileibr.org

Momenton!

n° 11 3-a sesmonato de 2008 oficiala organo de ILEI (Brazila Esperantista Junulara Organizo)

La reapero de la revuo!

Konkurso VEJO-Ataŝeo refoje okazas!

Intervjuo: JoMo!

Foto-mozaiko de nia junularo!

Kore lanĉas novan albumon.

Foto-raporto pri la vojaĝo de VEJO-Ataŝeo

Brazila Esperanta Parnaso
16x23cm - 288p



Organizintoj:
Sylla Chaves
Neide Barros Rêgo

Poesias escolhidadas do
Brazila Esperanta
Parnaso [dulingve]
16x23cm, 192p

Nemalhaveblaj!

neide.barros@terra.com.br